

$$\begin{aligned}
 abp(a-b) - ab(a^2 - b^2) - 2abc(a-b) + c^2 p(b-a) &= 0, \\
 (a-b)(abp - ab(a+b) - 2abc - c^2 p) &= 0, \\
 (a-b)[ab(p - (a+b) - 2c) - c^2 p] &= 0, \\
 (a-b)[ab(p - (a+b+c) - c) - c^2 p] &= 0, \\
 (a-b)(ab(-p-c) - c^2 p) &= 0, \\
 a-b &= 0, \\
 a &= b.
 \end{aligned}$$

### Referencoj

- Enriques F., Amaldi U. (1916). Zasadę geometrię elementarnej, Warszawa-Lwów
- Górowski J., Klakla M., Łomnicki A. (1997). O pewnej charakterystyce trójkątów równoramiennych i równobocznych, *Gradient I*, 13-20
- Górowski J., Klakla M., Łomnicki A. (1997). Trójkąt – niewyczerpane źródło problemów, *Matematyka 6*, 357-360
- Górowski J., Klakla, M., Łomnicki A. (2004). Zadania „na wymuszanie” jako środek matematycznej aktywizacji uczących się *Dydaktyka Matematyki 26*, 61-80
- Górowski J., Łomnicki A. (1998). Czwarty stopień wtajemniczenia, Eldonejo „Kleks”, Bielsko – Biała
- Jónsson J.H. (2007). Frandaj eroj por gimnazianoj. *Scienca Revuo 48*, 251-258
- Krygowska Z. (1977). Zarys dydaktyki matematyki, cz. II, WSiP, Warszawa
- Walsch W. (1986). Rola dowodzenia w matematycznym wykształceniu ogólnym, *Dydaktyka Matematyki 6*, 113-125

### Adresoj de la aŭtoroj

Dr. Jan GÓROWSKI	Dr. Adam ŁOMNICKI	Prof.dr.hab. Maciej KLAKLA
Str. Na stoku 2	Str. Bielowicza 53	Str. Sądowa 7
32 087 Penkowice	32 040 Świątniki Górne	31 542 Krakow
Pollando	Pollando	Pollando
<jangorowski@interia.pl>	<alomnicki@poczta.fm>	<smklakla@ap.krakow.pl>

### Priaŭtoraj informoj

Jan Górowski kaj Adam Łomnicki estas doktoroj de matematiko kaj laboras en la Pedagogia Universitato en Krakovo (Pollando). Ĉiu el ili skribis pli ol 80 sciencajn artikolojn kaj lernolibrojn. A.Łomnicki estas esperantisto, instruisto de tiu lingvo.

Maciej Klakla, matematikisto, laboras kiel profesoro en la Pedagogia Universitato en Krakovo, skribis pli ol 130 sciencajn artikolojn kaj lernolibrojn.

## Palatinato – ponto inter Germanujo kaj Francujo\*

Franz-Georg RÖSSLER

### Enkonduko

Palatinato ĉiam estis ponto – sed pli ĝuste ĝi devis esti pasejo, milita renkontiĝejo, batalejo, viktimo de pretendoj multaflankaj, oferaĵo de eksteraj kaj regionaj potencoj kaj potenculoj. Evidente, aktuale Palatinato troviĝas ene de la Germana ŝtato, kaj je la alia, plej proksima flanko de la ponto situas Francujo, la okcidenta najbaro, la precipa kunaganto dum la historio. Sed multaj aliaj nacioj, etnoj, religiaj grupoj transpasis tiun ĉi centraeŭropan ponton, multaj eĉ restis tie ĉi.

### La palatinata geografia kaj poseda situacioj

Temas pri la teritorio, kiun la aktuala mapo (Bildo 1) de la distrikto Rejnhesujo-Palatinato (*Regierungsbezirk Rheinhessen-Pfalz*) ankoraŭ priskribas. Oni aldonu iom de la nuna Sarlando kaj iom en la nordo, kaj forprenu episkopajn teritoriojn – jen jam la historiaj limoj, se ne mankus la dekstrarejna parto, nun apartenanta al Badeno-Virtembergo. La rivero Rejno ne estis tia limo, kia ĝi nuntempe aspektas.

Politike ekzistis longatempe interplektiĝo de la plej diversaj posedaĵoj: Elektoprince teritorio, regejoj de la episkopoj de Speyer/Spiro kaj Worms/Vormso, liberaj regnaj urboj, nobelaj posedaĵoj kaj aliaj propraĵoj.

\* Pentekoste de 2010 okazis la jara kongreso de la Germana Esperanto-Asocio kune kun Unuiĝo Franca por Esperanto en *Kaiserslautern* / Germanujo. La aŭtoro de tiu ĉi artikolo traspuris per prelego kun lumbildoj la komplikajn rilatojn inter ambaŭ landoj ekde la unuaj atestoj ĝis la dudeka jarcento kaze de la palatinata limregiono, la loko de la kunveno.

Jen resumo de la prelego kun mapa orientiĝo. Sesdekpaĝa monografio kun bildoj kaj pli ampleksa teksto pri la temo estas havebla kun multaj mapoj kaj ilustraĵoj en cifereca formo ĉe la aŭtoro: F.-G. Rössler “Palatinato – ponto inter Germanujo kaj Francujo”, *Edition Antiphon / Speyer* 2010. Ĉe la esperantigo de urbonomoj ne troveblaj en PIV mi sekvis la libron “Leksara kolekto de ofte uzataj propraj nomoj” kompilita de Ŝulco & Bermano (1989), Esperanto-Centro Paderborno.

## Palatinato tra la frua historio

La plej fama antaŭhistoria trovitaĵo de la regiono estas prahoma makzelo, elfosita proksime de la iama palatinata reg-urbo *Heidelberg* kaj tiel nomata *Homo heidelbergensis* (Homo hejdelberga).



Bildo 1: Proksimuma etendiĝo de la (iama) Palatinato

La **Keltoj** sur la “Monto de la tondro” (“*Donnersberg*“ laŭ la nomo *Donar*, la ĝermana dio de la tondrado), konstruis 700 jarojn antaŭ Kristo defendejon. Kaj jam la keltoj metis limojn en la regionan historion. Tiu *Donnersberg-Oppidum* (= setlejo) apartenis al la tribo de la Treviranoj kun la centro *Trier*/Treviro. Sude, transe de la rivereto *Isenach*, regione de *Bad Dürkheim*, komenciĝis la triboareo de la *Mediomatrici*, kies centro estis *Metz*/Meco, nomo ankoraŭ hodiaŭ deduktebla el la tribonomo. Jam tiutempe anonciĝas la interligiteco de la palatinata regiono kun Loreno.

Kune kun la konkerado de Gaŭlujo ankaŭ la palatinata regiono fariĝis romia kaj akceptis almenaŭ en la centroj la romiajn lingvon kaj kulturon. Kiam la **Romianoj** konkeris la regionon, en la rejna ebenaĵo setlis la ĝermana tribo de la Nemetoj kun la centro *Civitas*

*Nemetum*, la nuna urbo *Speyer*. Kontraŭ la ĝermanaj nordo kaj oriento protektis la “romia muro“, la limeso. La Romianoj transprenis la limojn de la landopartoj plej ofte de la Keltoj aŭ Kelt-Ĝermanoj, kaj ties etendiĝo ofte daŭriĝas, malgraŭ la detalaj kaj nemaloftaj politikaj ŝanĝoj, ĝis hodiaŭ. El la romia tempo postrestis la vito- kaj vinokulturo, kiu dominas ankoraŭ nuntempe la rejnebenajn palatinatan pejzaĝon, se ne ankaŭ la karakteron de la Palatinatanoj. Ankaŭ la kristanismo venis jam tiutempe. Ĝi transvivis, kiel ankaŭ postvivis la juda kredo. Malaperis altaroj kaj kultejoj de aliaj orientaj religioj, ekz. de la Mitrao-kulto.

Kiam la roma potenco malfortiĝis kaj disfalis, la **Ĝermanoj**, siaflanke puŝate de la aziaj Hunoj, kaptis siajn ŝancojn kaj senĉese transe de la limeso provis kaj sukcesis konkeri teritoriojn. Same kiel la apero de la Romianoj en la regiono, ankaŭ ilia malapero okazis foje en teruraj agoj kaj reagoj de la ĝermanaj invadantoj kaj Romiaj defendantoj, sed ankaŭ en nedramecaj intermiksiĝoj dum longa tempo. En la jardekoj post 400 p.K. la romia regado en tiu regiono fakte estis ĉesinta.

## Mezepoko

Jam romiaj ĥronologiistoj mencias la “danĝerajn“ **Frankojn**, origine devenantajn el la regiono de la hodiaŭa Nederlando. Post la romia epoko ili venkis, en la decida batalo de *Zŭlpen* (496 p.K.), la Alamanojn konkerintajn jam pli frue la sudon. Klodvigo (466-511), la reĝo de la frankaj Merovingoj (*Merowinger*), venkis ankaŭ pli poste en Alsaco, sed tamen Alsaco restis kulture almana, ĝis hodiaŭ. Palatinato kontraste transprenis la frankan-merovingan vivo- kaj setlostilon (vilaĝoj finiĝantaj je *-heim* kaj *-ingen*), lige kun la romkatolika kristaneco de tiu popolo post la baptiĝo de Klodvigo kaj la aliaj nobeloj. La antaŭe menciitaj *civitates* de la Romianoj transformiĝis sub la Frankoj en koherajn regionojn (germane “*Gau*“), loĝata de certa tribo: *Speyergau*, *Bliesgau*, *Wormsgau*, *Nahegau*, tiel paŭsante jam antikvajn dislimiĝojn.

La granda politiko tamen rolis pli okcidente. Tie la majordomo *Karl Martell* bremsis en la jaro 732 en la batalo de *Tours* kaj *Poitiers* la islamanan ekspansieron, tiel konservante kaj plifortigante la frankan potencon, kiu kulminis en *Carolus Magnus* / *Karl der Große* / *Charlemagne* / Karolo la Granda, sanktulo kaj heroo

de la Francoj same kiel de la Germanoj, kronita en Romo fare de la papo kiel Roma imperiestro en 800, “*dei gratia*“ (= pro la graco de dio). Jen la komenciĝo de la *Heiliges römisches Reich deutscher Nation* / **Sankta romia regno germana-nacia**. La noción *deutscher Nation* (germana-nacia) nur multe pli poste germanaj patriotoj aldonis. La imperio neniam estis nur “germana“.

Post Karolo la Granda, la grandega franka teritorio kune kun ties rega potenco rapide disfalis, tiel kreante la daŭran antagonismon inter la ŝtatoj/kulturoj franca kaj germana. Ĝuste inter ili situis la bufra batalo Palatinato! Okazis tiam, ke la karola regno ne povis gardi la unuecon, aparte pro la interna dismembriĝo en du partojn: la okcidenta estis konservanta la romian tradicion kune kun ties postaj lingvaĵoj, la orienta parto fariĝis decidite ĝermantrajta kun la germanaj lingvo kaj dialektoj. Evidentiĝis tiu **disduiĝo** en la Strasburgaj votoj (842), kiam Karolo “la Kalvulo“, la reganto de la okcidenta regno *Neustrien*, ĵuris en la lingvo franka-malnovgermana (“*Teodisca lingua*“). Inverse, Ludoviko “la Germano“, la reganto de la orienta parto *Aŭstrien*, ĵuris – por esti komprenata de la alia flanko – en la malnovfranca lingvo.

Plikomplikiĝis la situacio pro la tria tronpretendanto Lotaro, al kiu oni estis atribuinta terenon inter ambaŭ: *Lotharingen* / *Lothringen* / *Lorraine* / **Loreno**. Tiu ĉi lando fariĝis dum pli ol mil jaroj, eĉ ĝis la dudeka jarcento, kialo por kvereloj kaj daŭra luktoj inter la regnoj franca kaj germana, kun konsiderindaj implikoj kaj implikiĝoj de la najbara Palatinato.

En la mezepoko la urbo *Speyer/Spiro* fariĝis la centro de la germana regno. La malnova grafa gento de la *Salier*, origine devenanta el la nordokcidentaj landoj, estis akirinta ĉiam pli da teritorioj ĉe la supera Rejno, precipe en *Speyergau* kaj en *Wormsgau*, ĝis ili sentis sin hejmece tie. En 1024 la reprezentantoj de la orientfranka regno elektis la tiugentan *Konrad* la 2-an kiel germanan reĝon.

Konsentis post hezito ankaŭ la porparolantoj de la interlando Loreno, kiuj unue inklinitis al pli intima proksimeco al la okcidentfranka, do la franca regno. Per tiu ĉi elekto oni kredis solvita la “lorenan demandon“, opiniis sekurigita ĝian daŭran apartenecon al la orienta regno. Post la elekto la reĝa paro *Konrad* kaj *Gisela* urĝis montri sian potencon kaj la historian gravecon de tiu ĉi elekto


per konstruaĵoj kaj institucioj. La 12-an de julio 1024 *Konrad* fondis la **katedralon** en *Speyer*, ŝtoniĝantan regadopretendon de la *Salier*-gento. **Judoj** atingis Rejnnon jam kun la Romianoj kaj restis tie ĉi. Sed kadre de la kruciradoj preskaŭ tute pereis la florantaj judaj komunumoj, kiuj estis akirintaj eŭropavaste renomon pro la teologoj en la tri palatinataj urboj *Speyer*, *Worms* kaj *Mainz* sub la akronimo *SCHUM* (*Schpira*, *Uuormatia*, *Moguntiacum*). En *Spiro* ankoraŭ nun estas vizitebla la iama juda banejo, t.n. *Mikwe*.

### La estiĝo de la *Kurpfalz* / Elekta Palatinato

La germanaj reĝoj tiam regis migrante, ili “*zogen von Pfalz zu Pfalz*“, kio signifas “de regopalaco al regopalaco“, por tie surloke portempe plenumi la regajn devojn kaj dezirojn. La **regopalacaj ĉefoj**, administrantoj (*comes palatii*), estis komence samrangaj inter si, ĝis tiu ĉe Rejno fariĝis ĉiam pli grava kaj potenca. Lia titolo estis “*Comes palatinus de Rheno*“, kaj lia precipa teritorio situis ĉiam pli en la poste palatinata regiono. La aparta historio de la palatinata teritorio komenciĝis en la jaro 1156, kiam la imperiestro Frederiko Barbaroso instalas sian 16-jaran duonfraton Konrado en la postenon “Palatinata grafo ĉe Rejno“ kun la sidejo *Heidelberg*. Evoluis la afero. En 1214 Frederiko la 2-a, nepo de la Ruĝbarbulo, transigis la rejngraŝecon al la duko Ludoviko la 1-an de Bavarujo el la gento de la *Wittelsbach*-anoj. Tiu staris ĉe la komenco de la preskaŭ konstanta vitelsbaĥa regado de Palatinato ĝis la 20-a jarcento. La diversaj disbranĉiĝoj de la familio kaj ties teritorioj dum la jarcentoj tamen kaŭzis foje fundajn konfliktojn.

La institucio **Elekta princeco** instaligis jene: Dum en la franka epoko la liberaj popolanoj elektis siajn gvidantojn, poste ene de la diversaj triboj certaj familioj fariĝis gravaj kaj heredigis siajn gvidajn postenojn. Ili fariĝis *Herzöge* / dukoj, t. e. gvidantoj en la normala vivo kaj dum militoj, kiuj ankaŭ, kune kun aliaj nobeloj, elektis komunan reĝon. Post kiam la tria potenco dissolviĝis, aliaj funkciuloj surpris la potencon kun la rajto elekti la germanan reĝon. Tiuj nomiĝis *Kurfürsten* / Elektaj princoj pro la reĝoelekta funkcio (laŭ la germana vorto *küren* = elekti). Komence estis ses: tri ekleziaj (la episkopoj de *Köln*, *Trier*, *Mainz*) kaj tri laikaj: la duko de Saksujo, la markia grafo de Brandenburgujo plus nia palatinata grafo ĉe Rejno, kiu estis range la unua en la rondo kaj rajtis voti kiel unua. Pli poste aldoniĝis la reĝo de Bohemio.

La regiono rolis ankaŭ konsiderinde tempe de la **reformacio**. Spiro jam de la mezepoko estis “Libera regna urbo“, ĉiam en riva-leco kun la episkopa regado. Komprenoble ĝi jam frue akceptis la reformacion. Dum la tiea *Reichstag* / regneja kunveno en 1529, la imperiestro firme kaj decide intencis forigi la luterecon. La minoritata reformaciema frakcio ne konsentis la konsenton de la majorio pri la abolicio de la reformaciaj liberecoj. Ĝi protestis buŝe dum la kunveno kaj poste dokumentis tion per skriba “Protesto de la evangeliaj institucioj (*Stände*)“. Tiu protesto en *Speyer* hodiaŭ estas taksata mondhistoria evento pro la definitiva instalo de la evangelia kredo.



Bildo 2: Disiriteco de la palatinata teritorio (nigraj kaj grizaj partoj)

### La 30-jara milito

La palatinata reĝo Frederiko la 5-a multe kontribuis al la ekesto de la milito. Kiam la 17-jaraĝa princo edziĝis al Elizabeto Stuardo, filino de la angla reĝo, oni konsideris tion fortigo de la reformaciaj fortoj. Same lian ambician aspiron al la bohemia krono, post kiam la protestantaj bohemiolandaj nobeloj jetis habsburgajn reprezentantojn el fenestro de la praga kastelo (“Praga fenestro-jeto“) kaj tiel simbole detronigis la habsburgan reĝon. Poste ili elektis la Palatinatanon kiel sian reĝon, kiu kontraŭ preskaŭ ĉiuj konsiloj volonte kaj fiere akceptis tiun boheman aventuron.

Estis fakte aventuro, reĝe regi je tiu ĉi distanco en fremda lando, minacata de la proksima rivala habsburgano imperiestro. Ĝi daŭris nur unu jaron, tial oni nomis Frederiko la 5-an moke “Vintra reĝo“. En Bohemio la ofendita imperiestro estis venkinta, kaj en la forlasita Palatinato furiozis la milito, ja ne rekte kontraŭ la fuĝinta reĝo, sed kontraŭ la homoj en la urboj kaj vilaĝoj. Palatinato entute perdis la rangon de elektoprinca lando, devis ĝin cedi al Bavarujo, perdis ankaŭ sian mondfaman “*Bibliotheka Palatinata*“.

Tiam travagadis la landeton trupoj kaj militistaj bandoj el preskaŭ la tuta Eŭropo, ekz. hispanaj, kroataj, francaj, svedaj. Entute en Palatinato postvivis nur dek procentoj de la loĝantaro la 30-jaran militon. Du atestantoj raportis: “La palatinata lando similas al araba dezerto“. Kaj “estas pli da lupoj en la lando ol kamparanoj“. Post tridek jaroj da reciproka elĉerpiĝo la eŭropaj gvidantoj nove aranĝis la teritoriojn. Nove ekestis, sed tre reduktite, la “Palatinata grafeco ĉe Rejno“, nun ne plu la unua en la regno, sed nur la oka.

### La Palatinata hereda milito (1688 – 1697)

Malrapide pliboniĝis la situacio, sed post nur unu generacio Palatinato denove dronis en ruinoj kaj cindro – fare nun nur de la Francoj. Filino de la palatinata elektoprinco Karlo Ludoviko estis fariĝinta preteksto por la francaj atakoj. Li estis edziniginta sian filinon *Elisabeth Charlotte* al Filipo la 1-a de Orleanio, frato de la franca reĝo Ludoviko la 14-a, spekulaciante je la favoro de la potenca najbaro. Li, ja riskante fremdiĝon al la habsburga imperiestro kaj la bavaraj *Wittelsbach*-anoj, esperis gardi sian teritorion kontraŭ la franca konkeremo, ricevi pli altan agnoskon kadre de la germanaj kolegoj kaj reakiri perditajn teritoriojn.

*Liselotte von der Pfalz*, kiel oni poste nomis la filinon, akceptis la decidon, klare konante la patran mensan fonon. Iam ŝi skribis: “Inter ni dirite, oni ŝovis min tien ĉi kontraŭ mia bona volo; tiel mi estas fariĝinta la ŝafido, kiun oni por la ŝtato kondukis al la buĉotablo“. Ŝi ekloĝis en Versajlo, fariĝis katolika, ekhavis infanojn, kvankam la geedzeco ne estis feliĉa. La frivolan, tamen rigidan vivomanieron ĉe la franca reĝa korto ŝi povis kompensi per senĉesa interna ligiteco kun la palatinata patrujo kaj per senĉesa skribado de leteroj, cetere foje en palatinato kolorigita germana lingvo.

La franca reĝo havis kaŝajn intencojn per tiu ĉi parenceco. Sekve de la 30-jara milito palatinatere jam troviĝis kelkaj lokoj en franca posedo aŭ protekto, ekzemple regnaj urboj kiel *Landau* kaj fortikaĵoj kiel *Philippsburg*, se ne kalkuli la apudan *Elsaß*, fariĝintan franca Alsaco. Kaj, baze de la ĉiam kreskanta militista potenco, Francujo premis – laŭaserte “jure kaj justece” – aparte Palatinaton al refrancigo de ĉiu terpeco iam ajn estinta iel franca, nomante tion “*réunion/reunuiĝo*“. La franca strebo al rejnaj limoj montriĝis ne ĉesinta. Kaj la habsburga imperiestro ne povis adekvate reagi, bezonante ĉiun soldaton por la defendo kontraŭ la Vienon impetantaj Turkoj.

Mortis en 1685 la reganta princo de Palatinato, la frato de *Lise-lotte*. Jen venis la ĝusta momento por Ludoviko la 14-a. Malgraŭ kontraŭaj kontraktoj, li tuj postulis por Francujo Palatinaton kiel ŝian heredaĵon. Post multaj traktadoj, Palatinato kaj la imperio ĝenerale rifuzis la francajn pretendojn. Komenciĝis denove granda milito. Ripetiĝis la vundiĝo de la lando, la torturado de la popolo, same afliktaj kiel en la 30-jara milito. Sed tamen estis iom alie: la Francoj sisteme detruis Palatinaton por ne doni al la germana imperiestro kaj la regnaj trupoj ian lokon por retiriĝi. Vilaĝoj plene neniigis, urboj suferis konkeron kaj rekonkeron ofte pli ol kvinfoje, la loĝantoj de *Mannheim* devis mem detruji la proprajn loĝdomojn, por ke “eĉ ne unu animo povu vivi en la urbo“. Restis detruitaj la kastelo de *Heidelberg*, la katedralo de *Speyer*, la kasteloj en la tuta Palatinato. En la katedralo de Spiro frakasis la francaj soldatoj la imperiestrajn ĉerkojn kaj prirabis ilin. La altarojn kaj la madonan statuon, pilgrimocelon dum jarcentoj, ili dishakis je bruligno. La generalo *Duras* raportis la 2-an de junio 1689 al la milita ministro *Louvois*, ke Spiro estas plene bruligita.

Plej alte la franca “Sunoreĝo“ mem ja estis instiginta la konkeradon, sed pri la plena detruado respondecas la milita ministro *Louvois*, kiu inventis la devizon “*Brûlez le Palatinat!*“ / “Bruligu Palatinaton!“ Pleje kulpas la plenumanta generalo *Mélaç*. Brutalaj soldatoj kruele kondutis, sed estas ankaŭ rakontoj pri kompataj oficiroj, kiuj provis mildigi la rezultojn.

En la “*Paco de Rijswijk*“ (1697) Francujo tamen ne kontentige atingis siajn celojn. La rivero Rejno ne plene fariĝis limo kaj la revo pri franca-burbona universala monarĥio, do la venko de la iama

okcidentfranka regno super la nun habsburge dominata “Sankta roma regno“ orientfranka, ne plenumiĝis. Por Palatinato tamen restis dorno en la karno: *Landau* plu devis aparteni al Francujo, rapide fariĝonta la “plej forta fortikaĵo de la kristanoj“, konstrue de la milit-arĥitekto *Vauban*.

### **Mannheim / Manhejmo**

Post la detruado de *Heidelberg* la elektoprincoj ne plu riparis la damaĝegojn ĉe la kastelo, sed tute nove ekloĝis en la ebenaĵo inter la riveroj Nekar kaj Rejno. Jen preta por novaj militaj defioj kaj nova ebleco por digne reprezenti sian potencon kaj adekvate ĝui la barokan vivostilon. La palatinata “sunoreĝo“ estis *Karl Theodor*, racionalisma/raciisma/*aufgeklärter* absolutisto, reganta inter 1742 kaj 1799. Li aprezis la kulturon kaj la artojn ĝenerale, multe konstruigis kun prosperigo de ĉiuj konstruaj kaj dekoraj artoj, ekz. per la porcelana manufakturo en *Frankenthal* kaj la ĝardenego de la plezurkastelo *Schwetzingen*. Per la Germana nacia teatro (*Deutsches Nationaltheater*) en Manhejmo li provis kontraŭpezi la fortan influon de la francaj lingvo kaj spirito, kiuj tiam montriĝis modeloj por la tuta Eŭropo. La fama komponisto Mozarto (1756-1791) infanaĝe koncertis en Manhejmo, admirante la bonegan stacion de la tiea orĥestro kaj tie trovis sian edzinon *Konstanze*.

Kiam en la jaro 1777 formortis la bavara elekta princo el la sama gento sen hereduloj, efektiviĝis la hereda kontrakto de *Pavia* el la jaro 1329 inter la palatinata kaj la bavara linioj de la *Wittelsbach*-familio. Do la Palatinatano heredis Bavaruojn. Nur pro la devo *Karl Theodor* forlasis sian palatinatan regejon kaj ekloĝis en Munkeno. Tio tamen deprenis de la rejnaj regionoj ĉiam pli da inspiro, mono kaj graveco.

### **La Franca revolucio**

Kiam en 1789 aŭstraj kaj prusaj trupoj ekbatalis kontraŭ la revolucia Francujo, tiu tuj reagis. La venka kontraŭbato venis el la proksima *Landau* kaj direktiĝis al *Speyer* kaj *Mainz*. Tie la trupoj unue provis konvinki la popolon pri la idealoj de la franca revolucio. La teniĝo de la homoj al la nova situacio estis ambigua: la Francoj ja estis politikaj modeluloj rilate la homajn rajtojn, la pololan suverenecon – sed apenaŭ tolerataj kiel fremdaj mastroj. La liberigajn ideojn kaj instalaĵojn oni en la maldekstrarejnaj regionoj

volonte akceptis, ekzemple la sloganojn “*Egalité, liberté, fraternité*” kaj la novajn rajtojn pri balotado, fidindan juron (“*Code Napoléon*”), malferman justecon, relative sendependan administradon, pli justan impostan sistemon, la finon de la teritoria dissplitiĝo ktp. Aliaflanke ili ĝenerale ne volis aliĝi al Francujo, malgraŭ multaj allogoj kaj premoj.

El konvinkoprovo rapide fariĝis raba milito. La francaj revoluciuloj tre racie kaj sisteme kreis *Commissaires de grippe* kaj *Commissions d' évacuation* (“forprenaj komisiistoj” / “malplenigaj komisiuloj”), kiuj tiom rigore agadis, ke oni vere malplenigis la tutan Palatinaton je ĉiuj manĝaĵoj kaj posedaĵoj. Estas memorata la sarkasma komento senkompata: “Ĉio apartenas al ni. Al vi restu nenio ol la okuloj por priplendi vian sorton“. La teroro malrapide mildiĝis. Fine instaliĝis denove administracio fidinda en la nove kreita departemento *Mont Tonnère* seĝe de *Mainz*. La suda Palatinato aparteniĝis al *Bas-Rhin*, do, al Alsaco, kaj parto de okcidenta Palatinato atribuiĝis al la *Département Sarre* seĝe de *Trier*. Tiel Palatinato dum 20 jaroj plene apartenis al Francujo.

### **Die Rheinpfalz / Rejna Palatinato**

Post la malvenko de Napoleono kaj la reordigo de la eŭropaj teritorioj en la Viena Kongreso, Palatinato montriĝis regiono sen posedanto. Sed tiam regiono bezonis posedanton. La habsburga imperiestro *Franz* ne volis akcepti la foran Palatinaton en sia regno. Per komplikaj intertraktadoj li preskaŭ trudis en 1816 al la reĝejo Bavarujo la maldekstrarejnjan teritorion. Tiu, same fore situanta kaj sen landa ponto al la politika mastro, fariĝis laŭnome aŭ *Rheinbayern* aŭ *Rheinpfalz* aŭ simple “*Pfalz*“, restante – almenaŭ surpapere – bavara landoparto ĝis la fino de la Dua mondmilito.

### **Hambach / Hambaĥo**

Sub la bavara regado ekestis certa kontraŭbavara opozicio, ĉar la popolanoj estis al kutimiĝintaj el la franca tempo al rajtoj, kiujn la aliaj bavarujoj etnoj ĝis tiam tute ne havis, ekzemple la rajtojn pri la libereco de la parolo, pri la fondado de asocioj, pri la gazetaro, precipe tiun pri la memadministrado. Kune kun la liberala spirito, tiam en Germanujo vaste estiĝanta, kun ekonomiaj problemoj kaj la aspiro al tutgermana unueco, burĝaj kaj intelektulaj tavoloj de la palatinata socio invitis por la 27-a ĝis la 30-a de majo 1832 al la

kastelruino de *Hambach* super *Neustadt* por “Festo de la espero“, “Maja festo“, al “Germana majo“. Venis pli ol dudek kvin mil gastoj el la tuta Germanujo, simpatiantoj el Strasburgo, eĉ el la fora Pollando pro la tiama insurekcio de la poloj kontraŭ la rusa okupado. 30 parolantoj pledis por libereco kaj unueco en Germanujo, postulante respublikon – kaj en milda kaj en incita tonoj – sed ne kapablis formuli gvidliniojn por komuna agado. La ŝtata reago memkompreneble persekutis poste la gvidajn personojn kaj provis subpremi la ideojn. Nuntempe la kastelo servas kiel memorigejo pri la unua germana demokratiema amaskunveno, honorata kiel “Lulilo de la germana demokratio“.

### **Gründerjahre / Fondaj jaroj (fine de la 19-a jarcento)**

En la jaro 1865 fondiĝis en *Ludwigshafen*, “Ludovika haveno“ laŭ la bavara reĝo Ludoviko la 1-a. *Ludwigshafen* evoluis dum 150 jaroj al la plej granda urbo de Palatinato (aktuale pli ol 160 mil loĝantoj), ejo de la nuna mondfirmao “Badena Anilin- kaj Sodofabrike“ (BASF) kun ŝancoj kaj problemoj. Estas proverbo: “Se la BASF tudas, Palatinato suferas je kataro“.

Post la germana/franca milito de 1870-1871 *Elsaß-Lothringen* denove estis germana, tiel prenante de Palatinato la rektan apudliman premon de la franca najbaro. Kaj tiam okazis politike gravega fondado, tiu de la Dua Germana Regno en 1871, simbole en la spegulsalono de Versajlo, por kompensi per la humiligo de Francujo ties samajn agadojn en Germanujo. Palatinato ne ludis rolon, ĉar ja ne sendependa.

### **La Unua mondmilito kaj poste**

Post la malvenko de Germanio en la Unua mondmilito (kiu ne multe furiozis ene de la regiono, sed forte influis ties ekonomion) kaj per la homoperdoj Palatinato fariĝis “okupita lando“. La Francoj denove provis instaliĝi ĉe Rejno, provizore iel kunregadante en la palatinata teritorio kaj elĉerpante ties ekonomiajn fortojn. Tamen la reparaciaj pagoj, la fordono de okcidentaj partoj al Sarlando, la kutimaj miskondutoj de fremdaj soldatoj, la mankoj de multaj vivbezonaĵoj kaj la palatinata patriotismo – malgraŭ marĝena separatismo favore al Francujo – gvidis al la plifortiĝo de la naciismaj kaj naziaj fortoj ĝis la foriro de la Francoj en 1930.

## La Dua mondmilito

En la nazia tempo oni konstruis la aŭtoŝoseon tra la palatinata arbaro okcidenten, por pli facile atingi la kontraŭfrancan fortikajan bendon “*Westwall*”/“Okcidenta remparo”. En 1938 brulas la sinagogoj de la lando, kaj en 1940 la gaŭ-gvidanto / *Gauleiter Bürckel* raportas al Berlino sian “gaŭon senjuda / *Gau judenfrei*” pro la kaptado kaj fortransportado de la palatinataj judoj en la lagron de *Gurs* en la francaj Pireneoj. Je la pinto de sia potenco *Bürckel* regis super Palatinato, la Sarlanda teritorio “reveninta en la Regnon”, kaj la rekonkerita Loreno.

## Federacia lando Rejnlando-Palatinato

Post la Dua mondmilito, Sarlando denove fariĝis franca protektejo. En Palatinato la Francoj kontraŭ la historiaj limoj kunligis la terenojn de sia okupa zono al nova federacia lando, nome *Rheinland-Pfalz* / Rejnlando-Palatinato. Per la Dua mondmilito la francoj ne gajnis terenon, sed almenaŭ pacon kaj bonajn najbarojn en Palatinato. Kaj ili postlasis kelkon post sia kompleta retiriĝo: multajn vortojn el sia lingvo, eble iom de la spirito malantaŭ la vortoj “*Savoir vivre, Laissez-faire, Nonchalance*” por leĝera-senzorga iom frivola vivmaniero. Aktuale postvivas la historia *Kurpfalz* / Elekta Palatinato iel en la metropola regiono Rejno-Nekaro kaj rejnookcidente per la distrikta unuiĝo de Palatinato, ankaŭ per la diocezo *Speyer* kaj la Palatinata evangelia landa eklezio, per la komuna dialekto. Aliaj regionoj trovis aliajn alianculojn, ekz. la *Pamina*-regiono (Badeno, Alsaco, suda Palatinato). La okcidenta parto prefere orientiĝas al la *Saar-Lor-Lux*-regiono (Sarlando-Loreno-Luksemburgujo). Palatinato fariĝis prospera lando, nuntempe, eble unufoje en la historio, vere ĝuante sian pontan pozicion inter Germanujo kaj Francujo. La vundoj fermiĝis, la cikatroj ne plu doloras. La regiono, nun firme establita meze de Eŭropo, rigardas kun siaj vidindaĵoj kuraĝe al la estonteco.

### Adreso de la aŭtoro

Franz-Georg RÖSSLER  
Am Mönchsbusch 6  
DE – 67373 Dudenhofen  
GERMANUJO

<rozsas@web.de>

### Priaŭtora informo

La aŭtoro naskiĝis en 1949 en *Ruppertsberg* / *Weinstraße* (DE), instruis dum 40 jaroj muzikon kaj aliajn fakojn. Li komponas, verkas, faras bildojn, prelegas.

Esperantisto ekde 1985, li apogas la atentigojn de la Analiza skolo

## Skaraboj vizitantaj arbajn fungojn en Ĉeĥio

Oldřich Arnošt FISCHER

### Resumo

Ĉe arbaj fungoj en Moravio kaj Silezio (Ĉeĥio) estas trovitaj 32 specioj de skaraboj apartenantaj al 20 genroj kaj 13 familioj (*Histeridae, Leiodidae, Scarabaeidae, Anobiidae, Nitidulidae, Rhizophagidae, Erotylidae, Mycetophagidae, Cisidae, Melandryidae, Tetratomidae, Alleculidae* kaj *Tenebrionidae*). La plej abundaj skarabospecioj estis *Diaperis boleti* (LINNAEUS), *Eledona agricola* (HERBST) kaj *Cis boleti* (SCOPOLI). Ankaŭ la raraj specioj *Agathidium laevigatum laevigatum* ERICHSON, *Orchesia micans* (PANZER) kaj *Neomida haemorrhoidalis* (FABRICIUS) estas trovitaj.

### Enkonduko

La arbaj fungoj (Bildoj 1 kaj 2) estas signifaj komponantoj de nutraĵa ĉeno. Ĉar ili ne kapablas ebligi fotosintezon, ili malkomponas lignon kaj ŝanĝas ĝin en necesan nutraĵon (*Økland* 1995, *Kadowaki* 2010). La arbofungoj servas kiel nutraĵo por multaj artropodoj, precipe por skaraboj kaj larvoj de muŝoj. Kelkaj skaraboj serĉas en ili nutraĵon por si mem kaj sia idaro (Bildo 3), aliaj estas rabaj kaj voras aliajn artropodojn. La sinsekvo de skarabaj specioj ŝanĝiĝas depende de kreskado, formorto kaj malkompono de la arbaj fungoj (*Mitgaard* k.a. 1998, *Komonen* k.a. 2004, *Horák & Adamová*, 2009). Kelkaj skarabospecioj disvastigas sporojn de la arbofungoj (*Nikitsky & Schigel* 2004). En arbaj fungoj en la ĉirkaŭaĵo de Dresdeno (Germanio) trovis *Lorenz* (2001) skarabojn el 12 familioj. *Nikitsky & Schigel* (2004) konsideras 261 speciojn de skaraboj loĝantoj de arbaj fungoj kreskantaj en la ĉirkaŭaĵo de Moskvo (Ruslando).

La kono pri la sistemo de la skaraboj asociiĝintaj ĉe arbaj fungoj kaj iliaj nutraĵaj rilatoj estas ankoraŭ nesufiĉa kaj preskaŭ nenia atento estas dediĉita al la studado de tiu ĉi skarabogrupa en Ĉeĥio. La celo de tiu ĉi artikolo estas prezenti la trovaĵojn de skaraboj asociitaj kun arbaj fungoj en la ĉeĥaj Moravio kaj Silezio.